# TEA-BULTENO

7A JARO — MARTO - APRILO 2004 — NUMEROJ 3-4

## Programo en Tea - Marto

| | |
|---|---|
| 02 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 05 - vendredo | h. 20.00 - *Lecturae Dantis* en Esperanto |
| 09 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 12 - vendredo | h. 20.00 - Ni provu interpretadi! |
| 16 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 19 - vendredo | h. 20.00 - El Esperanto-Gazetaro |
| 23 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 26 - vendredo | h. 20.00 - Anita prezentos diapozitivojn pri Egiptio - 1ª parto |
| 30 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |

## Programo en Tea - Aprilo

| | |
|---|---|
| 02 - vendredo | h. 20.00 - Anita prezentos diapozitivojn pri Egiptio - 2ª parto |
| 06 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 09 - vendredo | h. 20.00 - Artikolo el ESPERANTO de UEA: "Edmond Privat kaj la privata lernejo Privat" |
| 11 - dimanĉo | Bonan Paskon al la tuta legantaro! |
| 13 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 16 - vendredo | h. 20.00 - Enigmoj en Esperanto |
| 20 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 23 - vendredo | h. 20.00 - Ni provu interpretadi! |
| 27 - mardo | h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 30 - vendredo | h. 20.00 - Kartludado: trisepo aŭ rumio? |
| 29apr./2majo | En Nova Gorica: Seminario pri pligrandigo de Eŭropa Unio |

***Kelkaj vortoj de la redaktanto*** Rapidpaŝe proksimiĝas printempo kaj naturo renaskiĝas plibeligante nian ĉirkaŭaĵon plejbunte. Ankaŭ ni homoj ene perceptas ian renovigitan energion, dank' al kiu pli entuziasme ni alfrontas la ĉiutagaĵojn kaj estas stimulataj entrepreni ion novan. Kaj certe tio okazas ankaŭ al vi, ĉu ne? Nu, estas la momento por eliri el la vintra dormejo kaj pli intense engaĝiĝi ankaŭ en la poresperanta agado: TEA atendas vin je malfermitaj brakoj! Ne gravas fari ion aparte specialan, sed eĉ plenigi enkluban vesperon per ia interesa programero, estas bona maniero kunhelpi.

Fine mi profitas de ĉi okazo, por rememori al vi ke ĉepordas la jaro 2006ª, dum kiu ni kune festos la 100-jariĝon de TEA. Por tion inde soleni ni bezonas vian daŭran kunlaboron. Vi ja certe scias, ke ni estas esplorantaj la asocian arkivon, por pretigi libreton enhavantan la centjaran historion de nia TRIESTA RONDO. Ni serĉas persono(j)n kiu(j) emas kaj amas **serioze** kaj **konstante** fari tiajn traserĉadojn. Temas pri foje peza, foje amuziga, foje eĉ kortuŝiga laboro, kiu certe donos kontentiĝon al la prizorgonto(j). Fidoplene mi atendas vin ĉiumarde ekde la 20ª horo!

*Elda*

## Monda Preĝo por Paco

Meze de la mirinda plureco de diversaj kulturoj, diversaj socioj, diversaj vivstiloj, diversaj religioj kaj filozofioj, kiuj konsistigas nian medion, en la koro de ĉiu homo bolas la deziro por pli humana, frateca kaj paca mondo la deziro por mondo pli harmonia kaj ekvilibra.

Trans iu ajn religia fundamentismo, ĉiuj homoj scias, ke por atingi pacon, oni devas ligi sin – per preĝo – al io pli granda ol si mem, al pli potenca estaĵo, al tiu estaĵo, kiun eĉ Zamenhof, per sia PREĜO SUB LA VERDA STANDARDO, alvokis dum la unua Kongreso en Bulonjo-sur-Maro.

En 1986, la papo Johano Paŭlo 2ª invitis religiajn gvidantojn el la tuta mondo "preĝi kune" por paco. Kaj sekve, en 2002 la papo ree alvokis ĉe ekumena evento en la itala urbo Asizo, por samcele preĝadi, ĉar: "*La hodiaŭa mondo bezonas manifestaciojn por paco kaj frateco*", kiel tiam oni asertis. Kaj certe tiu aserto daŭre validas.

Inspirate de tiu admirinda okazaĵo, grupo de esperantistoj apartenantaj al malsamaj religioj, kun koro plena je espero, invitas Esperantion, kaj la tutan mondon, ĉiu laŭ sia propra maniero, laŭ sia religio, laŭ sia lingvo eĉ, kune preĝi por paco, je ekzakta tago kaj horo, tiel ke dum kelkaj minutoj, centmiloj da koroj unuvoĉe pledu por pli paca mondo.

Tiu iniciato de Monda Preĝo por Paco okazos la 23an de majo 2004, je la sama horo ĉie en la mondo, akurate je la 14ª h UTC, laŭ universala tempo (je la 15ª h loke). Proponanto de la projekto estas la esperanta ttt-ejo Ĝangalo – **http://gxangalo.com** – la plej granda portalo pri novaĵoj kaj amuzo en lingvo internacia Esperanto ĉe Interreto.

Ĝi estas rilatpunkto kiel rapida kaj fidinda informadkanalo, vere internacia, kun pluraj redakcioj en Brazilo, Argentino, Britio, inter aliaj, donanta validajn servojn

por lingva demokratio kaj valorigo de la minoritataj etno-kulturoj.

Eĉ se la Monda Preĝo estos unu el la pluraj manifestacioj por paco, okazantaj dise en la mondo, la esperanta mesaĝo tamen sonu internacie, de loko flugu espero al loko, de lando al lando, de homo al homo, tiel ke dum kelkaj minutoj, la kuna homaro alvoku:

*"Neniam plu perforto! Neniam plu milito! Neniam plu terorismo! En la nomo de Dio, ĉiu religio portu al tero justicon, pacon, vivon kaj amon".*

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO strebas por organizo en Triesto de ekumena celebrado, kies detalojn precizigos sekvaj informoj, cele al nepra partopreno de la tuta TEA-anaro. Ĉiuj kune.

*Viglo*

# Spamo: komputila teroro



Malagrablan, eĉ "teruran" problemon por ĉiuj uzantoj de Interreto konsistigas rub-poŝtaĵoj – la tiel nomataj SPAM-oj – nome tiuj nepetitaj retmesaĝoj, kiujn perrete dissendas la fifamaj trudreklamistoj.

Pluraj sistemoj ekzistas kontraŭ tiu ĉi ĝenado. Kriterio por taksi bonkvalitan sistemon estas la "eraraj trafoj" aŭ "falsaj pozitivoj", nome tiuj nerubaj mesaĝoj erare blokitaj aŭ forĵetitaj.

**1) Solvoj ĉe uzanto aŭ servilo** – En Interreto la poŝta sistemo funkcias jene: ĉiu sendita mesaĝo alvenas al servilo – kutime apartenanta al la retprovizisto de la sendanto – kiu kontaktiĝas kun la servilo respondeca pri ricevado de mesaĝoj por la ricevonto. Poste tiu ĉi servilo disponigas la mesaĝon al la retpoŝtlegilo de la adresito.

Tre gravas tiu strukturo, ĉar ĝi ebligas du malsamajn respondojn al la spamo-problemo. La solvo estu ĉe la ricevanto en du eblaj lokoj:

**a)** ĉe la ricevanta servilo de la retprovizisto kaj tiamaniere la sendinto estas informita pri la bonkonkludo de la sendo, ĉu favora aŭ blokita ekzemple pro erara trafo; sed malavantaĝas la neebleco regi la servilon fare de la ricevanto;

**b)** ĉe la legilo de la ricevanto per uzado de kontraŭspama funkcio; tamen tio kaŭzas "erarajn trafojn" nerimarkitajn kaj de la sendinto kaj de la ricevinto.

**2) Ŝlosilvortaj filtriloj** – Solvo relative simpla estas filtri la mesaĝojn laŭ la kutime uzataj vortoj, sed povas okazi kribrado de aliaj mesaĝoj, do estigo de "falsaj pozitivoj", krome la spamo-sendantoj kapablas "trompi" la filtrilon ekzemple per interpunktitaj v.o.r.t.o.j. Do, ĝisdatigi filtrilon fariĝas troa laboro, ĉiam pli malfacila.

**3) Statistikaj solvoj** – Por eviti tiun laboron, elpensiĝis la statistika filtrado. Do, kiam oni rekonas rubpoŝtaĵon, la ricevanto surekrane alklakas specifan butonon: "tio estas spamo". Post iom da tempo, la programo kapablas ellabori statistikan analizon pri la rubpoŝtaĵaj vortoj, kiun ĝi uzas por kompari la alvenontajn mesaĝojn kaj determini tiujn, kiuj estas spamoj. La sistemo rilatas al unuopa uzanto kaj, do, cirkaŭiro malfacilas, tamen ĝi ne plene nuligas la riskon de eraraj trafoj kaj, krome, pro troa uzado de komputilaj rimedoj estas bezonata potenca komputilo kaze de abunda mesaĝtrafiko.

**4) Nigraj listoj** – La ejoj, konataj kiel SPAM-sendantoj, eniras liston zorge ellaboritan fare de specifaj grupoj, kaj komercaj kaj volontulaj: kun tiuj la servilo de la ricevanto komparas la kodnumeron de la sendanto kaj blokas la rubmesaĝojn. La sendinto ricevas informon de la servilo por eviti la ĉiam eblajn erarajn trafojn, kiujn povas estigi nefermitaj plusendiloj aŭ maŝinoj, same uzataj de honestuloj aŭ kaŝe regataj de piratoj.

**5) Grizaj listoj** – Baziĝas sur simpla ideo: rigardi ĉu la adresato jam ricevis mesaĝojn kun tiu unika kombinaĵo de sendanta maŝino, sendanta uzanto kaj ricevanta uzanto. Jesakaze, temas pri kutima korespondanto kaj la mesaĝo trairas; male, la ricevanta servilo diras al la sendanta: "tiu ĉi servilo estas tro okupata: provu poste": preskaŭ ĉiam la aŭtomataj programoj de trudreklamistoj ne provas denove.

**6) Sociaj solvoj** – Tiuj ĉi celas ŝanĝi la konduton de la sendantoj aŭ ricevantoj. Plej simple oni ne devus iam ajn respondi al la rubpoŝtaĵo: tiel la afero ne plu indus por la reklamistoj. Sed al tiuj sufiĉas eta proporcio da respondoj por pagi la laboron. Ĉe alia flanko eblas hontigi la sendanton per publika plendo aŭ ne aĉeto ĉe firmaoj, kiuj fireklamas. Bedaŭrinde vendantoj de dubindaj varoj aŭ trompemuloj fajfas pri reputacio.

Al ĉi lastaj celas la leĝaj solvoj, ilin malkaŝante per la adresoj aŭ aliaj rimedoj donitaj por ebligi la pagon fare de la trompoto. Sed tiu ĉi estas multekosta vojo kaj ofte la leĝo ne povas trairi la landlimojn, trans kiuj plejfoje alvenas la retpoŝto.

Alia solvo estas prezigi la retpoŝton por ke ĝi iĝu tro kosta por la reklamistoj, aŭ doni al la ricevanto opcion por pagigi la reklamistojn kaj logike ne la amikajn sendantojn. Tamen tiu ĉi sistemo, interalie malfacile starigebla, riskus perdigi la interkomunikadon kaj permesi misuzon de propra potenco aŭ senmeritan profiton al reganto de la pagsistemo.

Atendante taŭgan solvon, usona asocio *The Association of Apple Computer Users & Groups* (La asocio de uz-antoj de *Apple*-komputiloj) starigis premion – ĉu vi memoras la afiŝojn *Wanted* de la vakerfilmoj? – kaj pretas donaci la sumon de 10.000 dolaroj al persono, kiu povas kaŭzi la akuzon de profesia spamisto. Ĉu sufiĉos?

*Viglo*

## Konkurso Lerni Geografie

La solvo de la konkurso aperos en la maja-junia numero de **TEA-BULTENO**. Tiam vi ekscios, ĉu iu, lerte kaj sperte kaj korekte, kapablis ĝin solvi!

## Membro➥Membron

La revuo ESPERANTO daŭrigas sian kampanjon kun la celo akiri novajn membrojn. Se ĉiu el ni engaĝiĝus serioze, certe li/ŝi sukcesus akiri almenaŭ unu novan membron! Kaj kion tio signifus? Duobliĝo de UEA-membraro kaj duobliĝo de ESPERANTO-legantaro! Tial startis ĉi konkurso, kiu daŭros ĝis la fino de junio 2004: ĉiu UEA-membro, akirinta novan membron (en ajna kategorio), ricevos libro-premion. Krome, unu el la konkursantoj (decidos loto) ricevos la NOVAn PLENAn ILUSTRITAn VORTAROn de Esperanto. Ekzempleron de la Nova PIV ricevos ankaŭ membro, akirinta plej multajn novajn membrojn. La lotumado okazos dum la 89ª UK en Pekino. Adresante la ĉi suban tekston al la redaktoro de ESPERANTO, ĉu rete ĉu poŝte, vi aŭtomate eniros la konkurson. Jen la sendendaj informoj:

**➥ via nomo ➥ via UEA-kodo ➥ la nomo kaj adreso de la** (de vi akirita) **nova membro**.

Post alveno de la kotizo (eblas ankaŭ donaci ĝin!) vi eniros la konkurson.

Redakcio de la revuo ESPERANTO, Stano **Marĉek**,
Zvolenska 15SK - 036 01 MARTIN, Slovakujo
revuo@stonline.sk

## Premi per i futuri neo-diplomati

La Federazione Esperantista Italiana, nell'ambito delle iniziative in preparazione del 91° congresso mondiale di esperanto (Firenze 29 luglio-5 agosto 2006), ha deciso di incentivare lo studio e l'approfondimento della lingua esperanto. A questo scopo, in collaborazione con l'Istituto Italiano di Esperanto ha deciso di:

⇨ regalare ad ogni **socio FEI** che conseguirà il **diploma di 1° grado** una copia del libro PROPOSTE di Carlo Minnaja. Si tratta di un testo di studio adatto alla preparazione per il corso di 2° grado, contenente molti brani di letteratura italiana con traduzione a fronte, completata con note esplicative.

⇨ regalare ad ogni **socio FEI** che conseguirà il **diploma di 2° grado** una copia del libro ITALA ANTOLOGIO che raccoglie le traduzioni in esperanto delle opere più significative - sia poesia che prosa - della letteratura italiana dal 1200 al 1900.

⇨ regalare ad ogni **socio FEI** che conseguirà il **diploma di 3°grado** una copia del vocabolario italiano-esperanto di Carlo Minnaja.

Compito dei responsabili delle cattedre sarà di comunicare alla segreteria FEI i nominativi dei diplomati per la consegna del premio.

## 72° Congresso Italiano di Esperanto

**Treviso – 3-9 settembre 2004**

UN DIALOGO A 25: LA COMUNICAZIONE IN EUROPA

Sede del Congresso: l'Hotel Best Western al Fogher

Il programma sarà molto vario: conferenze sul tema, escursioni nei dintorni, concerti e spettacolo teatrale, e altre attività. Iscrivetevi al Congresso: sarà una magnifica occasione per dialogare in esperanto, per approfondire un tema di estrema attualità, per fare nuove amicizie e per conoscere una meravigliosa cittadina!

Per maggiori informazioni, contattate: Flavia Dal Zilio
Via Cappella, 17/2—31059 Zero Branco TV




## Premio Delfí Dalmau

Oni invitas vin partopreni en la 3ª ĵurnalisma premio DELFÍ DALMAU per gazeta artikolo, rilatanta ekologion en lingva kampo. Legu atente la ĉi suban regularon kaj... multnombraj verku pri ĉi tiu grava temo, tre bone konata de ĉiu esperantisto.

1. Oni aljuĝos ĉi tiun premion al la plej bona gazeta artikolo populariga kiu pritraktos ajnan aspekton en rilato kun la ekologio de la lingvoj, la lingva (mal)egaleco, la Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj aŭ la ebla aŭ fakta kontribuo de internacia lingvo kiel esperanto sur ĉi tiu kampo.
2. Oni rajtas prezenti konkursaĵojn en la kataluna kaj/aŭ en esperanto. Ĉiu partoprenanto rajtas prezenti tiom da tekstoj kiom oni deziros. Ili devos esti neeldonitaj kaj en ili estu menciitaj faktoj aŭ studoj diskonigitaj dum la kuranta aŭ dum la pasintaj jaroj.
3. La tekstoj ampleksos minimume kvin kaj maksimume dek foliojn DIN A4, tajpitajn je duobla spaco, kun 24 linioj ĉiupaĝe kaj 65 karaktroj ĉiulinie aŭ je simila amplekso. Oni devas liveri ilin kvinoble.
4. La monsuma premio estos 300 eŭroj. La teksto aperos en diversaj periodaĵoj, ĉu katalunlingve ĉu esperantlingve.
5. La personaj aŭtoraj donitaĵoj (nomo, adreso, telefonnumero, loĝloko kaj, eventuale, ret-adreso) estu kunsenditaj en aparta fermita koverto, sur kiu legeblos la titolo de la prezentita verko kaj, laŭdezire, pseŭdonimo aŭ devizo.
6. La **limdato** por la akcepto de originaloj estos la **31ª de aŭgusto 2004**. Oni sendu ilin poŝte al la adreso: C. Tossalet, 4 - ES 25460-Cerviá (Lleida) - Catalunya-Katalunio, indikante sur la koverto: **Por la 3ª Premio DELFÍ DALMAU**.
7. La ĵurion de la 3ª Premio DELFÍ DALMAU konsistigos jenaj personoj: Jordi Solé i Camardons, Luz Vazquez, Hector Alos kaj Abel Montagut, kiuj povos interkonsente proponi aliajn ĵurianojn ĝis maksimumo de sep personoj. La decidoj de la ĵurio estos neapelacieblaj. La ĵurio rajtos deklari ĝin nealjuĝita, se ĝi konsideros tion oportuna.
8. Oni proklamos la rezulton en la kadro de la Kataluna Kongreso de Esperanto en Ceret (Vallespir) la 1an de novembro 2004.
9. Kataluna Esperanto-Asocio rezervas al si la rajton publikigi, aparte aŭ kune en unu sola volumo, la konkursaĵojn kiuj superis la unuan fazon de la aljuĝo de la premio akorde kun ĝia specifa aljuĝa regularo, t.e., la verkojn al kiuj oni atribuis tri aŭ pli da poentoj super kvin en la komuna kvalifiko de la ĵurio.
10. La partopreno en la premio implicas la akcepton de ĉi tiu regularo.

*de Hector Alos i Font Rete: h.alos@esperanto-ct org*

---

Korespondi deziras el Lomé
GBOGATSE Komi Raphael
Ingénieur Bio- medical
04 BP 49 Lomé 04 TOGO
Fax 00228 226 18 92 <gbograph@yahoo.fr>

# *Mallonge pri...*

***Por filatelistoj*** La $23^{an}$ de Januaro 2004 en Vilnius okazis kunsido de la ŝtata komisiono pri eldon-planado de poŝtmarkoj kaj aliaj filatelaĵoj. Krom aliaj aferoj ĝi traktis ankaŭ skriban proponon de LITOVA ESPERANTO-ASOCIO koncerne eldonon lige kun la $90^{a}$ UK en Vilnius (2005). La asocio proponis eldoni ne nur poŝtmarkon, sed ankaŭ multajn aliajn filatelaĵojn (ekz. kolekton de poŝtmarkoj, porokazajn koverton, poŝtkarton, aerogramon, unuatagajn stampojn ka). Definitiva decido pri la konkreta kvanto de tiutemaj filatelaĵoj estos akceptita fine de marto ĉijare.

***La 28ª IJF*** okazos en Abetone (Toskanujo) de la $7^{a}$ ĝis la $13^{a}$ de aprilo 2004, kaj oni parolos (ĉiel) pri muziko! Kio estas pli bela ol Pasko kun esperantistoj? Ĝuu la muzikan etoson kiu karakterizos la ĉi-jaran IJF-on! Tuj aliĝu ĉe http://iej.esperanto.it/iej/ijf/2004/alig.php!

***Ankaŭ dum 2003 pli ol miliono!!!*** La retejo de SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO registris dum la ĵus pasinta jaro pli ol 1 milionon da vizitoj. Inter la $1^{a}$ de januaro kaj la $31^{a}$ de decembro ĝiaj paĝoj altiris ekzakte 1.050.877 vizitojn. Tre multaj estas, kompreneble, revizitoj, sed konsiderinda kvanto konsistas ankaŭ el novaj vizitantoj. La paĝoj ne nur vekas scivolemon, sed ankaŭ konkrete membriĝojn aŭ mendojn de lernolibroj de esperanto.

***Adresaro de ĉiuj Esperanto-grupoj en la mondo*** Ĉefe por helpi la laboron pri la kontaktoj inter la esperantistoj loĝantaj en ĝemelaj urboj, pri kiu zorgas Wu Guojiang (amikeco999@21cn.com), ekestis la ideo registri ĉiujn ekzistantajn Esperanto-grupojn en la mondo kaj samtempe la urbojn, kun kiu(j) ĝemelas la urbo kun jam registrita grupo. Tiel, post iom da tempo, estos eble facile respondi demandojn de la speco: ĉu ekzistas Esperanto-grupo en la urbo "Ikso"? Bonvolu registri vian grupon ĉe: http://www.miaflanko.de/lokaj_grupoj/ La programo estis farita de Karin Weirich, en la ttt-ejo de ŝi kaj de Robert Bogenschneider.

***Vizitantoj serĉataj*** 162 Esperanto-grupoj el pli ol 30 landoj nun troviĝas sur la maparo de EsperantoLand ĉe http://www.EsperantoLand.org/grupoj. Ekster Eŭropo nuntempe la rekordon tenas Usono per 20 enmetitaj grupoj, dum en Brazilo oni trovas informojn pri 16 lokaj rondoj. Afrikaj Esperanto-parolantoj renkontiĝas interalie en Niĝerio, Kongo, Tanzanio kaj Zimbabvo. La mapoj celas subteni la kontakton inter vojaĝantaj Esperanto-parolantoj kaj lokaj grupoj. Ili faciligu la vizitojn ĉe la lokaj rondoj, riĉigu ilian programon kaj montru la hodiaŭan ĉefan utilecon de Esperanto, t.e. amikecaj kontaktoj. La maparo estas parto de la pli vasta projekto ESPERANTOLAND de Lu Wunsch-Rolshoven.

***Baza legolisto de la originala Esperanto-literaturo*** Regule legemuloj petas informojn pri legindaj kaj legendaj libroj. Ili certe ĝojos ekscii, ke ekzistas iu "Baza legolisto de la originala Esperanto-literaturo", verkita de la fama William Auld. Li tie rekomendas, kiujn librojn legi. Tiu listo estas konsultebla je la adreso http://www.esperanto.be/fel/but/baza.html

***Paska konkurso ĉe aliaflanko.de*** Partoprenu ĝin kaj vi gajnos valoran premion - tiel vi subtenos UEA-Fondaĵon CANUTO. Informiĝu ĉe http://www.aliaflanko.de/ostern



## 56ª IFEF-Kongreso
## Sopron, Hungario
## 8ª - 15ª de majo 2004

Estas interese, ke la fervojistan kongreson komune aranĝos la aŭstraj kaj hungaraj gekolegoj. Dum la Kongreso funkcios speciala porokaza radioamatora stacio kun voksigno HG56VEK kiu eterkontaktiĝos kun la tuta mondo. La radiostacio celas informi la radioamatorojn de la mondo pri la eventoj de la kongreso kaj pri Esperanto. La deĵorantoj de la stacio ricevos frazaron kaj modeltekstojn. *D-ro Imre Ferenczy HA1UD*

## MALANTAŬ ĈIELARKO

Ia febro de amo prenis min
malantaŭ ĉielarko, kiam ŝin
mi vidis. Pluvetadis, sed la suno
montris al mi la vojon... Mia nuno,
pasinto kaj estonto kunfandiĝis...
Malantaŭ ĉielarko renaskiĝis
tuta korpo, la koro kaj l' animo.
Malantaŭ ĉielarko ĉiu rimo
naskas poemojn, kiujn ŝi adoras
kaj tiel nia amo daŭre floras
eĉ kiam ĉielarko malaperas.
Ĉielarko okazas, efemeras.
La febro pasas (same kiel ĉio),
ne la amo: ĝi estas poezio!

*Jorge das Neves, Rio de Janeiro, Brazilo*


*Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)* ISSN 0299-6987

**LA GAZETO**

**MONDKULTURA SENDEPENDA ESPERANTISMA**

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

lagazeto@osiek.org http://www.lagazeto.com


La abono egalas al 27 € kaj por novaj abonantoj estas speciala, aparta, tre interesa rabato! Por pliaj informoj, poŝte, rete aŭ telefone, vidu ĉi sube.

Ekde januaro 2004 funkcias kiel abon-peranto por Italio
Elda Doerfler – Via del Bosco 24 – 34131 Trieste
tel. 040 763244 - testudo@adriacom.it
Poŝtkonto: N° 17452996 Trieste Centro

*Parta enhavo de ĉi tiu Bulteno fontas el RET-INFO, NOVA SENTO kaj NUN*


BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Coroneo, 15 - 34133 Trieste
**tel/fakso**: +39 040 763128
**Reto**: esperantotrieste@adriacom.it; nored@estelnet.it
**http**://arte.triesteincontra.it/esperanto
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

# Ĉu vi volas gajni 50 eŭrojn?
# LERNU ANAGRAME!

Regularo de la konkurso

1. La italaj provincoj estas 103, laŭ la aldonita listo.
2. Anagramu la nomojn de la urboj kaj per la anagramita(j) vorto(j) elpensu etan frazon: ekzemple unu el la anagramoj de "Duno" (urbeto en provinco de Varese) estas "nudo" kaj la frazo povus esti "Skulptado de nudo".
3. Estas akceptitaj anagramoj konsistantaj el nur unu vorto. La PIV-ekzemplo estas tute erara!!!
4. Okaze de urboj kun du nomoj, anagramu ambaŭ aŭ unu el la du.
5. La lasta dato valida por la sendado de la solvo estas la 15ª de majo 2004.
6. La gajnont(in)o estos tiu, kiu—unua kaj plej frue—sendos la korektan solvon.
7. Sendu la solvon al unu el la jenaj adresoj:
   A) poŝte: Pier Giorgio Soranzo, Via Vittorio Veneto 4 - 33050 Bagnaria Arsa UD
   B) rete: lucido@adriacom.it
8. La premio konsistos el 50,00 (kvindek) eŭroj kaj la solvoj aperos en la TEA-Bulteno. La verdikto estos nekontestebla.

## Listo de la italaj provincoj

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1. Agrigento | 22. Catania | 43. Latina | 64. Perugia | 85. Siracusa |
| 2. Alessandria | 23. Catanzaro | 44. Lecce | 65. Pesaro-Urbino | 86. Sondrio |
| 3. Ancona | 24. Chieti | 45. Lecco | 66. Pescara | 87. Taranto |
| 4. Aosta | 25. Como | 46. Livorno | 67. Piacenza | 88. Teramo |
| 5. Arezzo | 26. Cosenza | 47. Lodi | 68. Pisa | 89. Terni |
| 6. Ascoli Piceno | 27. Cremona | 48. Lucca | 69. Pistoia | 90. Torino |
| 7. Asti | 28. Crotone | 49. Macerata | 70. Pordenone | 91. Trapani |
| 8. Avellino | 29. Cuneo | 50. Mantova | 71. Potenza | 92. Trento |
| 9. Bari | 30. Enna | 51. Massa Carrara | 72. Prato | 93. Treviso |
| 10. Belluno | 31. Ferrara | 52. Matera | 73. Ragusa | 94. Trieste |
| 11. Benevento | 32. Firenze | 53. Messina | 74. Ravenna | 95. Udine |
| 12. Bergamo | 33. Foggia | 54. Milano | 75. Reggio Calabria | 96. Varese |
| 13. Biella | 34. Forlì-Cesena | 55. Modena | 76. Reggio Emilia | 97. Venezia |
| 14. Bologna | 35. Frosinone | 56. Napoli | 77. Rieti | 98. Verbania |
| 15. Bolzano | 36. Genova | 57. Novara | 78. Rimini | 99. Vercelli |
| 16. Brescia | 37. Gorizia | 58. Nuoro | 79. Roma | 100. Verona |
| 17. Brindisi | 38. Grosseto | 59. Oristano | 80. Rovigo | 101. Vibo Valentia |
| 18. Cagliari | 39. Imperia | 60. Padova | 81. Salerno | 102. Vicenza |
| 19. Caltanissetta | 40. Isernia | 61. Palermo | 82. Sassari | 103. Viterbo |
| 20. Campobasso | 41. L'Aquila | 62. Parma | 83. Savona | |
| 21. Caserta | 42. La Spezia | 63. Pavia | 84. Siena | |